La tuto estas rapide kreskanta. Ne multajn svedajn retadresojn oni trovas en la adresaro, verŝajne pro tio, ke malmultaj en Svedio scias pri ĝi. Sed se vi havas propran retadreson (privatan aŭ oficejan) kaj deziras, ke via nomo aperu en la adresaro, sendu mallongan mesaĝon al [derk@saluton.iaf.nl](mailto:derk@saluton.iaf.nl) kun via nomo, retadreso kaj funkcioj en la esperantomovado. Se vi estas estrarano de esperanto-klubo, ekzemple, via retadreso povas funkcii ankaŭ kiel kluba retadreso. Bonvolu noti, ke ĉiu devas individue in-

formi al Derk Ederveen en Nederlando pri tio. Ne taŭgas informi pri alies adresoj.

La usonaj esperantistoj estas plej abunde reprezentitaj en la adresaro kaj ŝajnas, ke ili sisteme utiligas la eblecon informadi pri esperanto ankaŭ tiamaniere.

Nova sur "La flavaj paĝoj" estas listo de esperantistoj kun propraj informpaĝoj (de multaj mise nomataj "hejmpaĝoj"), kiujn oni aliras per la kriptita komando "http://". "La flavaj paĝoj" mem estas tia paĝo, sed ni trovas ankaŭ plurajn privatajn "paĝojn", kun plej varia enhavo: de simplaj sinprezentoj ĝis la plej ambicia inter ili: la tuta gramatiko de esperanto, kiun Bertilo Wennerberg pretigis.

## Taskoj por kluboj

Ni devas atenti ĉi tiun informkanalon, precipe nun, kiam ĝi estas relative nova kaj multaj scivolvas pri ĝi.

Tio validas unuavice por la kluboj. Unu ekzemplo: la komunumo de Tyresö starigis ĉi-aŭtune propran informojon (<http://www.tyreso.se>), kie oni prezentos la decidojn de la komunumo, la partiajn programojn kaj unuopajn politikistojn, aktualaĵojn kaj – la asociojn agantaj en la komunumo.

TEF (Tyresö E-förening) tuj anoncisian pretecon informi pri sia agado kaj iam en januaro la "paĝo" de TEF estos trovebla je tiu adreso. Kaj tio okazos tute senpage!

Informiĝu ĉe via komunumo pri iliaj planoj. Eble vi povos ricevi iom da helpo pri teknikajoj. Aŭ iu ĉe la najbara esperanto-klubo kompetentas pri tio. Ĝeneralajn informojn pri esperanto vi ne nepre bezonas prepari mem: alies solvoj estas tute bone uzablaj, simile kiel radio-stacioj pruntas inter si.

## Taskoj por SEF

Sed ankaŭ SEF kaj SEJU havas taskojn: informejo kun ĝeneralaj informoj, aktualaj kursoj, konferencoj kaj kongresoj, lingva retkurso, librolisto, adresoj de kluboj kaj kontaktuloj...

Ideoj certe ne mankas, sed por ĉiu tasko estos bezonata volontulo, kiu prizorgu ĝin. Ĉu vi por iu el ili? Aŭ por alia tasko?

La retadreso de *La Espero* povas esti uzata ankaŭ por dissendo de ideoj.

Franko Luin  
([luin@abc.se](mailto:luin@abc.se))

## Priesplorindaj informejoj

<http://infoweb.magi.com/~mfettes/>  
*Esperantologio kaj interlingvistiko*

<http://lightning.eee.strath.ac.uk/~duncan/eo/muziko/>  
*Muziko en esperanto*

<http://meyer.fys.ku.dk/~nordfalk/kef/>  
*Kultura Esperanto-Festivalo*

<http://mizar.am.ub.es/~dgaladi/HB/halebopp.bcn.html>  
*Hale-Bopp: Esperantlingvaj informoj pri la kometo C/1995 O1*

<http://www.bekkoame.or.jp/~karibe/jk.html>  
*82a Japana Esperanto-Kongreso*

<http://www.cl.cam.ac.uk/users/etg10/planlingvoj.html>  
*Planlingvoj*

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/fla-pa/flavaj-pagxo.html>  
*Flavaj paĝoj pri esperanto*

<http://www.cs.tu-berlin.de/kultur/esperanto/treffen/ijk96.html>  
*Internacia Junulara Kongreso 1996*

<http://www.cs.tu-bs.de/rob/people/csc/esperanto/deklaracio.html>  
*Deklaracio pri la esenco de la esperantismo*

<http://www.daimi.aau.dk/~byrial/esperanto/>  
*Dana informpaĝo*

<http://www.daimi.aau.dk/~byrial/esperanto/birdoj.html>  
*Birdovortaro dana-latina-esperanta*

<http://www.daimi.aau.dk/~byrial/esperanto/esperanto-adresaro.txt>  
*Elektronika poŝto (adresaro)*

<http://www.daimi.aau.dk/~byrial/esperanto/index.esp.html>  
*Bazaj informoj pri esperanto*

<http://www.e.kth.se/espo/pmeg1/ekzercaro.html>  
*Fundamento de esperanto (ekzercaro)*

<http://www.e.kth.se/espo/pmeg1/pmeg.html>  
*Gramatiko de esperanto (Bertil Wennergren)*

<http://www.e.kth.se/espo/pmeg1/roko/rokopopo.html>  
*Muzika terminaro en esperanto (roko)*

<http://www.helsinki.fi/~jslindst/denask-l.html>  
*DENASK-L ("denaskaj parolantoj kaj iliaj gepatroj")*

<http://www.helsinki.fi/~jslindst/proverbaro.html>  
*Proverbaro esperanta de Zamenhof, aranĝita laŭteme.*

<http://www.knooppunt.be/~paul/LRG-1.html>  
*Lingva retgazeto 1*

<http://www.knooppunt.be/~paul/LRG-2.html>  
*Lingva retgazeto 2*

<http://www.tios.cs.utwente.nl/esperanto/librokatalogo.html>  
*Librokatalogo de UEA*

<http://www.tios.cs.utwente.nl/esperanto/org/uea>  
*Universala Esperanto-Asocio*

<http://walli.uwasa.fi/yrikykset/ku/ku.html>  
*Esperantlingva informpaĝo de la ĵurnalo Kansas Uutiset*



## La plej serĉata libro

La 21-an de oktobro la plej serĉata libro en Svedio estis *Pipi Ŝtrumpolonga* de Astrid Lindgren – la esperanto-eldono de ĝi!

La kvara televida kanalo aranĝis tiun sabaton konkurson ("Uppdraget"), al kiu kvardeko da entreprenaj teamoj el la stokholma regiono aliĝis. Dum kelkaj horoj ili devis plenumi kiel eble plej multe da taskoj, kaj por ĉiu plenumita tasko ili ricevis poenton. Unu el la taskoj estis trovi ekzempleron de la esperanta eldono de *Pipi Ŝtrumpolonga*.

Neniu el la teamoj nek iu esperantisto anticipe sciis pri tio. La teamoj unue konsultis la telefonan katalogon kaj telefonis al EsperantoCentro. Tiuj vokoj estis laŭ kutimo plukuplitaj al Roland Lindblom, kies tuta sabata planado preskaŭ paneis pro ili. Sed rezulte ĉiuj ekzempleroj de *Pipi* en Vikingagatan 24 estis transportitaj al iu televida studio.

La stokholma katalogo havas ankaŭ plurajn numerojn de kontaktuloj sub la vorto esperanto. Kelkaj el ili povis helpi, aliaj sentis nur ĝenon, kiam la kvara aŭ kvina vokanto demandis pri la sama libro.

Membroj de aliaj teamoj subite memoris pri laborkamaradoj aŭ foraj parencoj, kiuj okupiĝas pri esperanto kaj konsultis ilin, kelkfoje eĉ sukcese.

Laŭ la postaj raportoj ni eksciis, ke ĉirkaŭ dekkdu da libroj estis trovitaj en Stokholmo kaj ke la teamoj, kiuj sukcesis montri *Pipin* en la studio estis inter la plej sukcesaj.

inko

## SEJU jarkunsidis

SEJU jarkunsidis la 12-an de aŭgusto en Roza Monto. La jarkunsido okazis eksterdome en varma sunbrilo kaj manĝante mirtelojn kaj frambojn.

Elektiĝis nova estrarano, Janko Luin, 16-jara gimnaziano el Tyresö. Kajsa Larsson, kiu estis en la estraro dum multaj jaroj, decidis pensiigi sin.

La nuna estraro estas Anna-Lena Eriksson, Umeå, prezidanto, Keiko Snarberg, Gotenburgo, sekretario, Fredrik Olofsson, Gotenburgo, kaskisto, kaj Janko Luin, Tyresö, estrarano.

Anna-Lena

## Regional paraplyorganisation

Vid ett möte i Örebro den 15 november bildades REAB, dvs. Regiona Esperanto-Asocio Bergslagen. En interimstyrelse bestående av Yuejin Guo, ord-



La montrofenestro de EsperantoCentro en Stokholmo estis ĉi-aŭtune aranĝita omaĝe al *Pipi Ŝtrumpolonga*, kies 50-jariĝon oni festas, kvankam ŝi por ĉiam restos 9-jara knabino.

(fotis Bengt Nordlöf)

förande, Puff Östling, sekretario, Inger Sundgren, kassör, och Lennart Svensson, språkrör, utsågs.

Dessa personer är villiga att ingå i den styrelse som kommer att utses vid en kombinerad kurs- och startdag resp. årsmöte vid Karlskoga folkhögskola söndagen den 14 januari 1996.

Syftet med föreningen är att sprida information om esperanto och stödja lokala klubbar och enskilda medlemmar som vill göra en insats för esperanto på sin hemort.

Se även annonsen här bredvid.

Lennart

instruado, kun multe da eblecoj buŝe kaj skribe ekzerci. La grupo vere ekŝatis la filmon!

Partoprenantoj en aliaj fakoj miras, ke oni tiel rapide povas lerni lingvon kaj multaj jam aliĝis al vesperaj kursoj por mem sperti la eferon. La fakto, ke Esperanto estas internacia popola movado por interkompreno, egaleco inter homoj kaj ilo por nova pensmaniero allogas multajn.

Estas ankaŭ interese, ke ankaŭ spertaj esperantistoj foje partoprenas por ĝui restadon en vera Esperantujo kaj samtempe instigi al memklara uzado de Esperanto.

Lars Forsman

## Tro (!) da studantoj en Karlskoga

Ĉiam pli da studantoj aliĝas al la Esperanto-kurso ĉe la Popola Altlernejo de Karlskoga, kie ni havas Esperantofakon ek de 1988.

25 horojn po semajne oni studas en 8-semajna komencanta kurso aŭ en same longa daŭriga kurso. Multaj sekvas ambaŭ kursojn sinsekve.

Ĉi-aŭtune aliĝis tro da studantoj kaj la fako devis malakcepti multajn aliĝantojn kaj rekomendi novan kurson por komencantoj (8/1 – 1/3 1996).

Jam 33 nacioj partoprenis niajn kursojn kaj ĉi-aŭtune albanino kaj japanino estas el la plej malproksimaj landoj. Plej multaj faros nian ekzamenon – propedeŭtikan al la Internacia Ekzameno – kaj ekinstruos en sia hejmloko.

La instruado estas tute en Esperanto kaj jam post du semajnoj la studantoj uzas Esperanton, ofte sian nuran komunan lingvon. Ĉi semestre ankaŭ "Mazi en Gondolando" estas uzata en la

## Bergslagen

Endagskurs, 3 nivåer med start/årsmöte vid Karlskoga folkhögskola 14 januari 1996.

Samling: 8.30–9.30, avslutning ca 18.00.

Kostnad: vuxna 190,-, studerande 160,-,

barn i vuxensällskap 8–12 år 30,-, under 7 år gratis.

För ytterligare information och anmälan ring  
019 - 36 38 19 (Puff), 018 - 23 45 57 (Inger),  
0590 - 127 35 (Lennart S), 0247 - 333 12  
(Lennart P).

# Aktuala prezaro

de propraj eldonaĵoj

## Legaĵoj

Aniarao	90
Bona rido	30
El la vivo de Zamenhof	30
Inter sudo kaj nordo	60
Islandaj pravoĉoj, <i>bindita</i>	60
Islandaj pravoĉoj, <i>broŝurita</i>	45
Jaroj sur tero	60
Kredo Floroj Dinamito	45
Mi serĉis oron kaj oleon	45
Orm la Ruĝa	150
Printempo de morto	60
Ŝipestro rakontas	45
Tra lando de indianoj, <i>bindita</i>	60
Tra lando de indianoj, <i>broŝurita</i>	45
Vivu la stel'	30

## Lerniloj

Allas andra språk	75
Ek!	75
Jen nia mondo 1	90
Jen nia mondo 2	90
Kompendium	120
Raka vägen till språkkunskap	45
Språket över gränserna	45
Svensk esperantogrammatik	75

## Vortaroj

Esperanto-svensk ordbok	90
Etimologia vortaro 1	150
Etimologia vortaro 2	150
Etimologia vortaro 3	150
Etimologia vortaro 4	150
- Etimologia vortaro 1+2+3+4	500
Lilla ordboken	90
Ordbok Svenska-Esperanto	450
- komputora versio por Macintosh	600

## Kasedoj

Folioj de mia memoro ( <i>Ĵomart kaj Nataŝa</i> )	90
Denaska kongresano - 2 sonbendoj	120
(rakontoj de Sten Johansson)	

Ĉiuj prezoj estas en svedaj kronoj (SEK).

ELDONA SOCIETO ESPERANTO  
Vikingagatan 24 · 113 42 Stockholm · Svedio

## TRADUKU!

# Temo: labormerkato

Ĉi-foje ni elektis tekston, kiu eble ne estas ĉiudetale plej modela sveda lingvaĵo. Vi ne traduku same malbone. Sendu vian proponon antaŭ la 15-a de januaro al: Bertilo Wennergren, Sannaldalsv. 4, 117 65 Stockholm.

HighTech-företag i Eksjö söker kvalificerade tekniker

När Håkan Gustafsson, chef för Arbetsförmedlingen Teknik Ekonomi Data i Jönköpings län, bjuder in till en rundresa i Eksjö visar han inte bara en gammal fin kulturbygd. Eksjö är också en modern och expansiv kommun. Och här finns några högteknologiska företag som skapat sig ett namn på världsmarknaden; Olsbergs Hydraulic och WINDAB - två företag som söker kvalificerad arbetskraft.

För många är Eksjö främst en sjukhus- och militärstad. Här finns det stora Höglandssjukhuset och regementena 1 12 och Ing 2, samt Arméns Fältarbetscentrum.

-Men Eksjö är mycket mer än så. Här finns en bredd på näringslivet, från traditionell svensk basindustri som sågverk och gjuterier till vad vi i dagligt tal kallar HighTech-företag.

Det berättar Björn Ståhlberg, vd och projektledare för Eksjö 2000 AB.

(El "Nytt Jobb" 22 maj 1995)

Bertilo Wennergren  
Per Aarne Fritzson

Flanke sekvas tradukpropono de la teksto en La Espero 2/95. (Ĝi estas kunmetita el la alsenditaj proponoj, krom en tiuj okazoj, kiam ni havas fortan motiva rekomendi ion alian.) Oblikva streko (/) apartigas du aŭ pliajn alternativajn tradukojn. Angulaj krampoj, kiel en "lernejstr[in]o", montras eblan, sed nedevigan, aldonon. La ciferoj montras al la subaj notoj. Ni bonvenigas viajn reagojn!

## Intonacio/parolmelodio

En/dum/ĉe ordinara konversacio ni variigas la intonacion. Ni povas esti mallaŭtaj, vortŝparaj/lakonaj kaj malrapidemaj, sed la frazoj ne sonas egale. Ankaŭ en radio ili ne sonu tiel.

Ni havas ekzemple la bedaŭrindan kutimon ĉiam/konstante altigi<sup>1</sup> la voĉon/tonon/voĉtonon fine de la frazo. Tio donas al la prezent(ad)o karakteron/nuancon de elnombrado/listigo<sup>2</sup>, kaj tio certe malofte estas la intenco.

Alia malbona kutimo/miskutimo estas mallaŭtigi<sup>3</sup> la voĉon ĉe la fino de la frazo. La enhavo fariĝas malfacile kaptebla, kiam la voĉo malaperadas/velkas en malfortan murmuron. Krom tio/krome la aŭskultanto neeviteble tiriĝas en dormon, kiam tiaj malaperantaj frazoj sekvas unu post alia en longa vico.

Ŝajnas al mi, ke plensŝtopitaj magazinprogramoj ofte estas postanoncataj<sup>4</sup> murmure/en/per murmuro, kvazaŭ estus neinterese informi, kies voĉoj ĵus aŭdiĝis. La murmurantoj ja devus konsci, ke tio ne taŭgas!<sup>5</sup>

1. Laŭ la kunteksto ŝajnas klare, ke temas pri altigo de tono, ne laŭtigo.
2. Trovi bonan tradukon de la Sveda "uppräkning" ne estas facile. La vortaro de Vilborg donas *nomado*, sed ĝi tute ne taŭgas ĉi tie. La figura signifo de *elnombri*, kiun ni uzis, mankas en PIV, sed ekzistas praktike (vidu ekz. PAG §131). Ankaŭ *listigi* mankas en PIV, sed troviĝas en aliaj vortaroj.
3. Ĉi tie ŝajnas, ke temas ĉefe pri mallaŭtigo de voĉo, sed ja ankaŭ iom pri malaltigo de tono. En la sveda oni povas aludi al ambaŭ signifoj per "sänka", sed en Esperanto oni devas precizigi.
4. Ni ne konas ian kutiman esprimon por "avannonsera", sed ni trovis la proponon *postanongi* ne miskomprenbla. Alia propono estis *ĥananongi*, kiu eble povus miskompreniĝi kiel "anonci la finon" (kio cetero estas la traduko de "avannonsera" en la vortaro de Vilborg...), sed la signifo ja ne estas tio, sed "anonci pri io okazinta".
5. La lasta sveda frazo estas laŭ ni speciala idiomaĵo, kiun oni ne traduku laŭvorte.

PAF & BW

Sukceson en via laboro  
por esperanto kaj ĉion bonan  
en la jaro 1996!

La estraro de SEF

La Espero

# En Krakovo, ĝemelurbo de Gotenburgo, blovas printempaj esperanto-ventoj

*Antaŭ ĉirkaŭ unu jaro esperantistoj de Gotenburgo kontaktiĝis kun esperantistoj en Krakovo, Pollando, proponante amikecan kontakton: Krakovo ja estas ĝemelurbo de Gotenburgo. La unua kontaktpersono en Krakovo estis Jadwiga Gibczynska, jam antaŭe konata en Gotenburgo.*

En Krakovo troviĝas kelkaj E-klubo, jam longe agadintaj. Tamen – post la diskutoj oni elektis tie kiel kontaktklubo la plej novan klubon, Esperantista Klubo-UNESCO, pro tio, ke ĉi tiu klubo planis vere aktivan klubagadon.

Kio estas ĉi tiu UNESCO-klubo? Marian Kostecki skribis en la klubogazeto *Krakova Sonorilo* (1/94) tiel: "La klubo estas – antaŭ ĉio – nove fondita esperanta organizaĵo en Krakovo, funkcia landskale kaj kunlaboranta kun eksterlandoj, kies laborprogramo baziĝas sur la rekomendo de UNESCO – la organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo – pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco, kaj edukado rilate al homaj rilatoj

kaj fundamentaj liberecoj, akceptitaj de la Ĝenerala Konferenco en sia dekoka sesio en Parizo, la 19-an de novembro 1974".

Inter la statutaj celoj de Esperanta Klubo-UNESCO estas i.a. jenaj taskoj: popularigado de lingvaj valoroj de la Internacia Lingvo, Esperanto, ĉefe en la medioj de loka instruistaro, sciencistoj, verkistoj, studentaro, kaj kulturaj sociagantoj, helpe de la principoj difinitaj en la supre menciita rekomendo de UNESCO.

La klubo kunlaboras ankaŭ kun la amaskomunikiloj. La suprecititaj agadoj estas nur parteto de ilia programo.

Kompreneble kontaktoj inter esperantistoj en Krakovo kaj en Gotenburgo ne estis multnombraj; tamen ni sendis unu al la aliaj niajn klubogazetojn/-informilojn.

La jam citita *Krakova Sonorilo* aperas kvar foje jare. La gazeto havas ne nur informojn pri okazintaj kaj okazontaj aferoj, sed ĝi estas kultura kaj scienca gazeto.

La krakova klubo havis sian unuan esperantan printempan feston la 1-an – 6-an de junio. Venis invito al niaj klubanoj, kaj mi decidis viziti Krakovon.

La programoj estis multflankaj, kaj kulturaj kaj sciencaj. Krome ni havis ekskursojn kaj vizitojn. Dum la ekskursoj oni povis konstati, ke malgraŭ multaj ekonomiaj malfacilaĵoj multaj domoj estis jam rekonstruitaj kaj ankaŭ tion, ke Pollando estas hodiaŭ tute alia lando ol antaŭ ĉ. 10 jaroj, kiam mi vizitis Krakovon.

Kompreneble ĉifoje plej interese estis por mi aŭdi pri esperantaj agadoj.

Iniciate de la klubo UNESCO okazas agado en Vojevodio Metodika Centro, kiu similas al niaj instruistaj seminarioj, tamen la instruprogramo estas iom pli vasta. Ĉi tiu centro estas bonega centro por popularigi Esperanton. Unue: la klubo havas kontaktojn kaj kun instruistoj kaj kun tiuj, kiuj studas pedagogion. Kompreneble la plej multaj el la klubo-membroj estas instruistoj, sed tamen ĉiu, kiu volas membriĝi, havas rajton je tio. Ĉar la Vojevodio Metodika Centro laboras kune kun Jagelona Universitato, ankaŭ de tie kaj venis kaj venos membroj. Due: ĉi tiuj personoj havas kontaktojn kun infanoj en vartlernejoj, en lernejoj kaj kun studentoj en altlernejoj.

La kontaktoj ne estas nur eblaj, sed jam nun oni povas konstati realajn rezultojn. Mi vere surpriziĝis, kiam mi

aŭdis, ke pasintjare oni instruis Esperanton en tri lernejoj en Krakovo kaj ankaŭ en kelkaj vartlernejoj. Pli ol 100 lernantoj havis E- instruadon en siaj programoj. Krome oni planas plivastigi la E-instruadon al pli multaj lernejoj.

Samtempe kun la instruado en lernejoj oni laboras por Esperanto inter studentoj kaj instruistoj en Vojevodio Metodika Centro, kie Esperantista Klubo-UNESCO havas sian ejon. Dum la printempaj tagoj la direktoro de la centro promesis, ke ankaŭ li mem post ne longe lernos Esperanton kaj krome li diris, ke la Esperanto estos unu el la lingvoj, kiuj apartenos al la lingvoinstruadoj de Vojevodio Metodika Centro. Li daŭrigis: "...kaj kial ne, ĉar ĉi tiu centro ja laboras por komuniki".

Tre populara estas nuntempe en Krakovo la Freinet-pedagogio. La gvidantino de la asocio "Krakova Societo de Animantoj de Freinet-Pedagogio" estas Grazyna Maszczynska-Cora, kiu estas ankaŭ prezitanto de Esperanta UNESCO-Klubo. Ŝi laboras kiel lektoro en Vojevodio Metodika Centro, sed flanke de ĉi tiu laboro ŝi esploras pri instruado pere de la Freinet-metodo al psike handikapitaj infanoj Esperante! – kaj ricevas surprize bonajn rezultojn, pri kiuj ŝi rakontis al ni.

Kelkaj eksterlandanoj partoprenis en la printempa festado, i.a. profesoro Geraldo Mattos el Brazilio. Li estis vizitanta prelegisto en Jagelona Universitato. Dum la printempa festado li prelegis pri E-literaturo kaj pri sia propra verkado.

Krome ĉeestis vizitantoj el Germanio, el Rumanio kaj el Ĉinio. Mi ne estis sola el Svedio. Ankaŭ Kerstin Rohdin decidis partopreni en la festado. Ŝi prelegis pri Astrid Lindgren kaj pri ŝia verkado. Mi prezentis mian tute novan libreton publikigitan en esperanto, *Klopotu kompreni min*. Kadre de ĉi tiu prezentado mi parolis ankaŭ pri kapablighado de aŭdohandikapitaj infanoj. Krome Jadwiga Gibczynska prezentis mian poemkolekton, *Interrilatoj*, kaj legis kelkajn poemojn el ĝi.

La esperanta printempa festado de krakova Esperantista Klubo-UNESCO havis verajn printempajn ventojn en E-movado. Ni esperu, ke esperantistoj ankaŭ en aliaj landoj kaj urboj tiru inspiron el krakovaj labormetodoj por disvastigi esperanton, kaj ne malpli multe por junaj individuoj.

Aira Kankkunen

## När har du haft en esperantotröja på dig sist?

Kanske dags igen?

T-tröja, vit

storlekar M, L, XL, XXL 100 kr

T-tröja, grå

storlekar M, L, XL, XXL 100 kr

Piké med krage, vit

storlekar M, L, XL, XXL 150 kr

"Pratbubblan" är motivet på tröjorna



Esperanto i Väsby

Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby  
Tel. 08-590 882 10 · Fax 08-590 864 61

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**ILEI-KONFERENCO 1995**

# Esperanto en Perm kaj Duŝanbe

*En la kongreslando Finnlando pasintan someron mi post Tampereon partoprenis en konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).*

*Roza Petuĥova montras sian instrumaterialon*


Ĝi okazis en Övik proksime de Borgå. Inter ni estis du lingvo-instruistinoj el eksa Sovetunio. Ili ambaŭ hejme instruas esperanton. Dum la konferenco ili demonstraciis lecionojn. Jen kelkaj vortoj pri la demonstracioj.

**Instruado por mezlernantoj en Perm**

Perm estas granda urbo, kiu situas en la Uralmontaro en Siberio. Ĉirkaŭ la urbo estas arbaroj de pinoj, piceoj kaj foliarboj. Multaj bestoj vivas tie, ekzemple ursoj, vulpoj kaj leporoj. Tiaj faktoj gravas, kiam Roza Petuĥova instruas espe-

ranton. Ŝi mem verkis kaj faris ĉiun instrumaterialon kun bildoj de bestoj ktp. Ne eblis por ŝi alimaniere havigi materialon. Ŝi ankaŭ sukcesis enkonduki esperanton dum ordinaraj lerno-

roj. Roza instruas ĉefe la ger-



manan lingvon en mezlernejo. En unu klaso de 11-kaj 12-jaruloj estas 25 lernantoj. Ĉiuj volis lerni esperanton. Sed por esperanto ŝi elektis la 8 plej talentajn. Ili lernas esperanton dum 4 horoj semajne – 2 ordinaraj horoj kaj 2 horoj sabate kune kun la gepatroj. Ankaŭ ili volas lerni.

Roza kunportis al Övik vidbendon de lecionoj en esperanto. La infanoj sidis sur benko kaj malantaŭe sidis la gepatroj. La instruado estis malnovstila kun severa disciplino. Rapide iris la pridemandado pri vortoj, datoj de la historio de esperanto ktp. Sed ankaŭ estis gajaj prezentoj. Roza estas aktorino kaj muzikistino. En la leciono ŝi miksis muzikon kaj rolludojn, en kiuj ŝi kaj la infanoj partoprenis.

**Instruado por blindaj infanoj en Duŝanbe**

Natalija Kasymova estas blinda instruistino de germana kaj esperanta lingvoj en Duŝanbe, la ĉefurbo de Taĝikio en meza Azio. Ŝi instruas en lernejo por blindaj rusparolantaj infanoj. Natalija antaŭ multaj jaroj venis de Ukrainio al Taĝikio.

La konferencanoj en Övik demandis ŝin, kiel ŝi laŭ la Cseh-metodo povas instrui blindulojn. Per sono ŝi instruas. Kaj per sento. La infanoj tuŝas modelojn de bestoj el ligno kaj ŝtofo kaj Natalija bojas kiel hundo, muĝas kiel bovino ktp. Ŝi instruas ĉiujn infanojn samtempe.

Por lerni la diferencan inter dika kaj maldika, ili tuŝas dikajn/maldikajn librojn. Ili metas fingron en glaso da akvo. La akvo estas varma aŭ malvarma. En tia maniero ili lernas adjektivojn.

Natalija ankaŭ rakontis al ni pri nuntempaj ekonomiaj malfacilaĵoj en Taĝikio. Mirinde estas, kiel entuziasme kaj gaje ŝi tamen praktikas sian profesion.

Kerstin Kristoferson

**KRUCVORTA ENIGMO**

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1								■		
2										
3										
4			■							
5	■								■	
6										
7										■
8					■					
9										
10								■		

**Horizontale**

- 1 Konfirmas – En iu loko
- 2 Ne katolik'
- 3 Amfibian – Flokmaterial'
- 4 Frakci' – Necesejo
- 5 Post kvar – Fino de mito
- 6 Okazaĵe – Membr'
- 7 Estas netuŝita – Kolekt'
- 8 Instrumentar' – Rotacianta korpo
- 9 Tropikan arbon
- 10 Pozitivan elektrodon – Sufikso, kiu devigas

**Vertikale**

- A Sovaĝa porko – Rilata al peno ne renkonti
- B Sentiman
- C Longa temp' – Inklino al justo
- Ĉ Nun Volgograd
- D Havanta – Nomo de la 21-a
- E Ludkart' – Baltin'
- F Komenc' – Unuiĝintaj Nacioj
- G Aviadilo – Pasie
- Ĝ Femalen – Betulon
- H Gentojn – Akvomas'

**SOLVO DE 95/2**

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	A	B	E	L	A	S	P	I	K	
2	M	A	T	E	M	A	T	I	K	O
3	A	L	I	N	E	A	N	O	N	
4	R	U	S	I	N	O	N	N	A	
5	A	S	N	O	R	D	O	T		
6	T	R	O	M	A	R	D	O		
7	T	R	I	P	O	R	D	O		
8	R	A	D	F	E	N	D	I	G	A
9	I	D	I	O	T	O	G	I	S	
10	B	A	S	T	O	N	P	A	R	O

# Esperantoförbundet

## Erbjuder medlemservice - betala till UEA via SEF Kanske detta kan vara en trevlig julklapp?

Du betalar till SEFs specialkonto genom att använda nedanstående inbetalningskort och vi ser till, att Din avgift kommer UEA tillhanda. Ange på talongen vad inbetalningen avser och Ditt telefonnummer om vi behöver fråga något. Notera noga namn och adress på den betalningen avser.

Vill du fråga något kan du göra det hos:

**Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, Tfn 0415-50152**

Individuell medlem hos UEA

Kategori		avgift kr
MA	Individua Membro kun Jarlibro kaj revuo Esperanto	430
MJ	Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto). Bonvolu noti la naskiĝdaton sur la pĝ talono.	170
MG	Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperantomovado (berättigar ej till rabatt av kongressavgifter). Lämplig som "familjemedlem".	70
SZ	Kotizo por Societo Zamenhof, aparta societo por financaj apogantoj de UEA (ne inkluzivas membrecon en UEA). La minimuma kotizo	860
PT	Patrono de TEJO ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.	510
DM (-T)	Dumviva Membro. Pagas por la tuta vivo en unu fojo. Oni ricevas la Jarlibron kaj Esperanto, kaj ĝis oni estas 29-jara, membrecon en TEJO kun Kontakto kaj TEJO tutmonde.	10.750
DPat	Dumviva Patrono. Pagas unu fojon. Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel DM, kaj estas aŭtomate membro de Societo Zamenhof.	107.500
DPT	Dumviva Patrono de TEJO pagas por la tuta vivo en unu fojo. Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel PT.	12.750

 **POSTGIROT SVERIGE**  
Meddelande till betalningsmottagaren

Betalar härmed följande avgifter för 1996

Medlemsavgift UEA, Kategori _____	
För: _____	Kr _____
Medlemsavgift UEA, Kategori _____	
För: _____	Kr _____
<b>Sammanlagt</b>	<b>Summa</b>

Telefon nr: \_\_\_\_\_ Född år: \_\_\_\_\_

### INBETALNING/GIRERING A

PKS: OCR/Kod 1  
PKM: 2 • Konto • Avg • Bel •

Till postgirokonto nr <b>14 74 29 - 5</b>	Avgift	Kassastämpel
Betalmottagare (endast namn) <b>SEF Specialkonto</b>		
Avsändare (namn och postadress) Gäller för: _____ _____		
Eget kontonr vid girering		
Svenska kronor	öre	

I DETTA FÄLT FÅR ANTECKNINGAR INTE GÖRAS - RESERVERAT FÖR POSTGIROT

#

#

#00#